



PENSEO

N-ro 251

sept. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Josep Pleadin (Kroatio)



ALHAMBRO

Tremetas en Alhambro la suna harmonio.
Palacon de miaj revoj mi vidas en ora tembro.
Malstreĉe kuŝas ombre ĉiu laca membro.
En brika ruĝ' alhambra jarcente samas ĉio.

Solene lirlas la fontano en luksa eleganto.
El puntaj arabeskoj Nasridoj ankoraŭ gvatas.
Granadon, la ĉastulinon, Alhambro egale
svatas.
El la moskeo sonas preĝo kaj muezina kanto.

Alhambro, vi ekster tempo vivanta belulino,
magia principino de la islama epopeo,
de arto kaj kulturo suvereno kaj korifeo,
mia eterne edifa sonĝo, pentrita per karmino!



Anteo (Ĉinujo)



nul dividas nul

nulo kreis nulon.


la tero kaj ĉielo
naskiĝis el inter dentoj nevideblaj.
nenion regas la nulo.

la buŝoj senlangaj
moviĝas kiel konkoj.
nenio estas ja ĉio.

senŝajnaj vortoj en la korajn pluvas.
jen la rilato inter nubo kaj nebulo.
akvo trafas akvon;
brulo granite daŭras.
la fingroj for de la manoj

trovas vojon en la ŝuoj sur la kapo.

Martha Carmona Ríos (Meksikio)



Kion vi volas

Jam mi ne havas prudenton
mi freneziĝis ! ...
Jes...mi sentas...
Mi ne volas !
Kiam mi devas esti...
kiam mi volas esti...
Ne...
ne rigardu miajn okulojn
mi kovras ilin,
ke vi ne vidu...
ĉio ekzistas en ili...
vero...
amo,
deziro...
anksieco,
pasio...
revoj.
mi malamas...

tiun ĉi koron perfidan,
ĉar...
li ne komprenas !

li devigas min paroli...
kiam mi devus silenti,
li devigas min plori...
kiam mi volas rideti,
li devigas min ami...
kiam mi volas ignori,
li devigas min memori...
kiam mi volus forgesi.

Pulsas ĝi !...Jes...
ĝi bategas !
Sed ne por mi
Kion vi volas ?
Nur pulsu ! Batu forte !
Mi volas ... ne volu!
Mi amas... ne amu !
Mi sentas... ne sentu !
Mi ploras... ne ploru !
Mi vivas...

Jes...
Vivu !...
vivu por mi...
mia kara
ribelema koro...



Petro PALIVODA (Ukrainio)

Pordo

Infaneco...
Homoj surstrate
pri io debatas.
Estas pordo farbata
de l' suno

orkolore.
Mi miras:
kiom da jaroj trakuris –
restis la pordo ora.

Radioricevilo

Mi sentas planedospiron
en raŭko de ricevilo.
Sur ĉiu diapazono
embuskas por mi eventoj.
El nigra kesteto fluas
kaj voĉo sola,
kaj bru' de tribunoj.
Per turno facila de agordilo
mi ŝanĝas planedohumoron.




Luno kaj steloj

parolas pri io
mi iras silente

Amo ne havas nomon

Ĝi havas sunon
sur la tuta ĉielo,
blindigan.
Ĝi havas venton,
okulojn per sablo
kovrantan.
Al kiu mi iras,
blindulo?
De nun ne videblas.



Mori (Usono)



Ŝtonumo!

Virino
ĝis la brusto
entere!

Ŝtonoj
frapadas ŝin
pluvere!

Ŝi forpasas
en hororo
sufere!

Jen honto
por la homaro
envere!

Paŭlo Silas (Brazilo)



AL SUPRO

*Komenco de komenco de
ŝtuparo de Jakobo...
Simbolon de la daŭra Kre'
montras la karna robo.*

Marjorie Boulton en la poemo "MISTERO"


En subter' unua ŝtupo
El mallum' kondukis paŝojn
Al la sun', al bril', al supro.
Hel' ebligis novajn naskojn.

Sed subite supropordon
Sigelfermis lertaj manoj.
Kaj kavernaj voĉokordoj
Aŭskultigis kantan dramon:

Povplena Kreo decidis tion:
Senhăta karno kontrolos ĉion,

Ĉar malvivulo sentumomanke

Malkapablas senti sin solida.
Ne malfermiĝos internoflanke
Tiu tombopordo sigelita.



Neide Barros Rego (Brazilo)



Amdeklaro

Mia patrio ne estas
la lando, kie mi naskiĝis,
nek la lando, kie mi loĝas.
Mia patrio
estas la granda mondo
kreita de Dio.
Kaj ni estas gefratoj,
ĉar ni ĉiuj estas Liaj gefiloj.
Danke al Zamenhof
ni havas komunan lingvon:
nian amatan Esperanton!...
Kaj ni ankaŭ havas
unusolan flagon:
la verdan standardon
kun la verda stelo de l' espero.
Espero de amo,
de frateco
kaj de paco!

PROTESTO

Dum malvarmo kaj malsato
falĉos homojn sur la stratoj
(por tro multaj mankas hejmo),
mi rifuzos festi.

Dum militoj blinde murdos

kun avido, fanatike
(frato ja mortigas fraton),
mi rifuzos festi.

Dum ekzistos senlaboro,
kaj eĉ analfabeteco
kreskos daŭre kaj minace,
mi rifuzos festi.

Dum prosperos antaŭjuĝoj
pri koloro, kred' aŭ raso
(pro vanteco kaj malamo),
mi rifuzos festi.

Dum prosperos egoismo,
homojn gvidos monavido
al perforto kaj al krimo,
mi rifuzos festi.

Dum infan' kaj maljunulo
restos daŭre senprotekto,
(sole, time kaj angore),
mi rifuzos festi.

Sed esperon mi ne perdis
(ĉu frenez' aŭ utopio?):
certe baldaŭ ŝanĝo venos,
kaj mi festos ĝojoplene!



Cezar (Germanujo)



DIO MALAMAS ŜILDOJN

ŝildodisputo

Kiam olda blankharara ulo
preterpasis kun aliaj surstrate,

manifestaciante kun kartonŝildego,
sur kiu estis skribita la fia sermo:

*"Alkoholo kaj putino
estas por la hom' la fino!";
legeblis sur ŝildeto
montrata stratrande
de ridetanta junulo:
"DIO MALAMAS ŜILDOJN".*

Ie proksime troviĝis
la sprita junulino Juvi Nerde,
kiu, kvazaŭ okulume,
fotis la viglan disputon.

En la ribelemaj sesdekokaj jaroj oni
vokis
en manifestacioj, ke *"la fantazio
konkeru la straton!"* Tio okazis
en tiu brile fotita momento.



Stanislaw Rynduch (Germanujo)



SOMERE

Kiel bele en somero
privestita nur per ero,
ĉe la strando en aero,
revi ame kun espero.

Tre agrabla la zefiro
naskas ĉe mi la deziron:
kion fari dum vespero
en tre bela ammaniero.

En la somera etero
bongustas al mi biero.

Preta estas la deziro,
por hodiaŭa vespero....

Ankaŭ vi do ne cerbumu,
pli bone vi amindumu.
La travivo estos via,
pli bona ol esti pia,
Somere 2012



Helena Tylipska (Italujo)



I am vivis...

Paŝo post paŝo
sur monton plue pluen...
—ŝton-voj antikva

Pli alten grimpas
hedero sur ŝtona mur'
—memor' antikva

Kaj vent' ululas
tra vakuaj fenestroj
—kantoj antikvaj

Lariko branĉojn
etendas al ĉielo
—preĝo antikva

Animoj vagaj
konfesas al la mondo
kulpojn antikvajn

Alpaj kasteloj
plenaj da vivaj voĉoj
—en temp' antikva

Benjameno KRAŬS (Usono)



Gento

Kio estas gento?
Onia firmtero
kiam skuas somero
kun varmeco sed manko de kunsento.

Kio estas gento?
Malhelpo al homoj,
kial' de l'pogromoj,
flugilo de malfacilega vento.

Kio estas gento?
Eskapendaĵo sed
kiel eskapi? Pied'?
Ni portos ĝin ĝis la firmanento.

Cecília Meireles (1901 –1964)



Transito

En mi fortpuras jarcentoj
en kia libera kombin':
ciferoj, nomoj, lokoj de la mondoj,
kaj la povo de la senfin'.

Ne utilas demandi
pri vortoj de mi diritaj:
vanaj rakontoj cirkonstancaj,
a ŝoj desperaj, mildaj, a ŝoj spitaj.

(Bagatela koncedo
dum ĉi mia irado:
vojaĝa poŝtbildo, efemera adreso,
alibio por mia ombro laŭlonge de la pado...)


Mi komencas pli transe:
kie ĉi-ĉio finiĝas, kaj jen solec'.

Kie en kvieto brakumas sin tero kaj ĉielo,
kaj eksplikoj senvaloras el ajna spec'.

Esperantigis



Uel (Brazilo)



Atahualpa Yupanqui (1908 –1992)



La fratoj

Mi havas fratojn tiom multajn
Ke mi ne povas kalkuli,
En la valo, la montaro,
En la pampo kaj en la mar'.
Ĉiuj ili kun siaj suferoj,
Kun siaj revoj ĉiuj ili,
Kun esparaĵoj antaŭ si,
Kun memoraĵoj post si.

Mi havas fratojn tiom multajn
Ke mi ne povas kalkuli

Homoj kun manoj varmegaj
Pro la forta amikeco,
Kun iu plendo por plori,
Kun iu preĝo por preĝi,
Kun horizonto vastega,
Kiu ĉiam malproksimiĝas,
Kaj tiu forto por serĉi ĝin

Per obstino kaj volo.
Kiam ĝi ŝajnas apuda
Tiam ĝi estas plej fora.

Mi havas fratojn tiom multajn
Ke mi ne povas kalkuli

Kaj tiel ni daŭre marŝas
Harditaj per soleco.
Ni perdiĝas en la mondo,
Kaj revenas al renkont',
Kaj tiel ni rekonas nin
Por spekti la foraĵon,
Por kunmordi kantaĵojn,
Semojn de vastegeco,
Kaj tiel ni daŭre marŝas
Harditaj per soleco,
Kun en ni niaj mortoj
Por ke neniu postrestu

Mi havas fratojn tiom multajn
Ke mi ne povas kalkuli
Kaj amatinon tre belan
Kiu nomiĝas Liberec'

Esperantigis



Tjeri (Francujo)

Dalida (1933-1987)



Dekokjara li ĵus estis

(1973)

Dekokjara li ĵus estis,
Samkiel infano li belis,
Forta kiel vir'.
Kompreneble tiam someris
Antaŭ li miajn mi kalkulis
Noktojn da vintr'.

Mi ordigis miajn harojn

Mi nigrigis la okulojn
 Pri tio lia rid'!
 Kiam je mi li proksimis
 Ion ajn mi oferuntis
 Por logi lin

Dekokjara li ĵus estis,
 Tio plej forte pravigis
 Pri lia venk'.
 Li neniun amvorton diris
 Li amvortojn opiniis
 Ke estas vant'.

Li diris : « cin mi deziras.
 Viditan filmon mi memoras :
[Verda Tritik'](#) »
 Super kuŝej' improviza
 Malkovriĝis al mi rava
 Bela ĉiel'.

Dekokjara li ĵus estis,
 Tio preskaŭ lin havigis
 Tro da memfid'
 Kaj dum li ree vestiĝis
 Mi malvenke returniĝis
 Al mia solec'

Dezirus mi lin reteni
 Tamen lasis mi lin iri
 Sen ia gest'
 Li diris „ nu, ne malbonis !“,
 L'inferan naivon havis
 Li de l'junec'

Mi ordigis miajn harojn
 Mi nigrigis la okulojn
 Pro kutimiĝ'
 Nur mi estis forgesinta
 Ke duoble mi dekokis.

Tradukis



Roland Platteau
 (Francujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Reveno al la naturo

—laŭ ĉinesko Fendie'er*
 Al arbaro ni per busa vetur'
 pilgrimas
 jen kun plezur'.
 Renkontas
 nin aer'
 freŝa en pur'
 kaj vento
 kun karesa murmur'.

Altaj arbegoj per verda velur'
 nin ŝirmas
 en ombr-obskur'.
 Fore de
 urba bru'
 beton-kultur'
 ni trovas
 nin en vera natur'.

2012-08-14



*Fendie'er (papilio): ĉina fiksfirma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa (x=senrima)

**Antaŭ kelkaj tagoj, ni vizitis Arbaran Parkon Jiuguoqing kaj ekhavis la senton reveni al la naturo.

Al amiko en for'

—laŭ ĉinesko Zhuzhici*
 kara amiko en for',


ĉu vi fartas en ĉi hor’
bone sen mia kuno,
sen patrolanda favor’?

kara amiko en for’,
ĉu vin turmentas dolor’
de sopir’ al patrio,
kie pompas ruĝ-aŭror’?

kara amiko en for’,
ĉu ankoraŭ kun fervor’
vi kaj lernas kaj studas
en la scienca esplor’?

kara amiko en for’,
ĉu vi dronas en labor’
forĝesante ripozon
nur por homara trezor’?

kara amiko en for’,
vin mi tenas en la kor’.
ĉu vi scias, vi ĉiam
hantas en mia memor’?



*Zhuzhici (Bmabuoĵ): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Mandio (Ĉinuĵo)

Testamento de iu patrino

—laŭ ĉinesko Suzhongqing*

Testamentis la patrin’,
“Ĉe mia vivfin’,
mi nun donas al vi
laŭ mia destin’

nenion

krom inklin’
hardi vin
per honesto
dum vivrutin’.”

*Suzhongqing (kora sento): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Josep V. (Katalunio)



Amuziĝo

—laŭ ĉineska skemo Tiaoxiaoling*

finfin'! finfin'!
tiaoxjaolin'
vekgis la emon
tuj verki poemon
nome, nome
ridi kor-endome

(Mone, mone?
Tute ne! Sindone!)

Cindy Mckee (Usono)



Debuto de la malbelulino de la vilaĝo

—laŭ ĉineska skemo Tiaoxiaoling*

Bela, bela?
Nur en tag' malhela!
Mortis ĉiu ulo
per ŝia okulo
Loku! Loku!
Virojn ni pli stoku!

*Tiaoxiaoling (Flirta kanto): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Niuniu (Ĉinujo)

Forfuĝado de varmega

—laŭ ĉinesko Dingfengbo*
 ond' de varmega aer'
 minacas super la ter'
 sufoka, malkompleza
 peza
 pelas homojn al desper'

fuĝas de arda varmo
 svarmo
 da homoj la malfortaj
 al lokoj friskaj en mont'
 al mond'
 de verdejoj komfortaj

**Dingfengbo (Subigo de ŝtormo): Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarnĝo aabba /ccdeed*


Mandio (Ĉinujo)

Dorna rozo

—laŭ ĉinesko Dielanhua*
 en vento la dorna roz'
 skuas kapon
 triste kun nervoz'
 jen sola en ĉi okaz'
 kun enkora furioz'
 neniun kun kurioz'
 eĉ aliras
 al roza korp-poz'
 ĉar ĝi ja per pika doz'
 minacas kun serioz'

**Dielanhua (papilio super floroj): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)*

Maupassant (1850-1893)



Miaj karaj, diris la grafino, nun necesas ke vi enlitiĝu.

La tri infanoj, knabinoj kaj knabo, leviĝis, kaj iris kisi sian avinon.

Poste, ili iris diri bonan vesperon al S-ro la parokestro, kiu vespermanĝis en la kastelo, kiel li faris ĉiuĵaŭde.

La pastro Maŭduo, sidiginte du infanojn sur siajn genuojn, pasis siajn longajn brakojn vestitajn de nigro malantaŭ la kolo de la tri infanoj, kaj alproksimigante iliajn kapojn per patra movo, li surfrunte kisis ilin per longa tenera kiso.

Poste, li remetis la infanojn surplanken, kaj la geetuloj foriris, la knabo antaŭe, la knabinoj malantaŭe.

Vi amas la infanojn, sinjoro la parokestro, diris la grafino.

— "Tre, Sinjorino."

La maljuna virino, rigardis al la pastro per siaj helaj okuloj.

"Kaj... ĉu via soleco neniam tro tedis vin.

— Jes ja, iafoje."

Li silentis, hezitis; poste reparolis: "Sed mi ne naskiĝis por la ordinara vivo.

— Kion vi scias pri tio?

— Ho! Mi ja scias tion. Mi estis farita por esti pastro, mi sekvis mian vojon."

La grafino ĉiam rigardis al li:

— "Nu! sinjoro la parokestro, tion diru al mi, diru al mi, kiel vi decidiĝis rezigni al ĉio, kio faras ami la vivon al ni, al ĉiu, kiu konsolas kaj subtenas nin. Kio puŝis vin, decidigis vin devojiĝi de la granda natura irejo, la geedziĝo kaj la familio? Vi estas nek ekzaltito, nek fanatikulo, nek morozulo, nek

malgajulo. Ĉu iu evento, aflikto, kiu decidis vin dediĉi al la dia servo per eternaj votoj?"

La pastro Maŭduo leviĝis, kaj alproksimiĝis al la fajrejo, poste li etendis al la flamoj siajn dikajn ŝuojn de kampara pastro. Li ĉiam ŝajnis heziti por respondi.

Li estis granda maljunulo kun blankaj haroj, kiu de dudek jaroj pastris en la vilaĝo de Sankta-Antono-ĉe-Roko. La gekampanoj diris pri li: "Jen brava homo!"

Fakte, li estis brava viro, bonvola, familiara, dolĉanima, kaj precipe malavara. Kiel Sankta Marteno, li estus duone tranĉinta sian mantelon. Li volonte ridis, kaj ankaŭ ploris por iu bagatelo, kiel virino tiu, kiu eĉ iom malutilis al li en la malmolkora spirito de la kamparanoj.

La maljuna grafino de Savilo, izoliginta en sia kastelo de la Roko, por eduki siajn genepojn, post la sinsekvaj mortoj de sia filo kaj sia bofilino, tre amis sian parokestron, kaj diris pri li: "Li estas koro."

Ĉiujauĉe li venis pasigi la vesperon en la nobeldomego de la kastelestrino, kaj ili amikiĝis, per bona kaj sincera amikeco de maljunuloj. Ili sin aludvorte komprenis reciproke preskaŭ pri ĉio, estantaj ambaŭ bonuloj el la simpla bonkoreco de la simplaj kaj dolĉanimaj uloj.

Ŝi insistis: "Ek! sinjoro la parokestro, liavice konfesdonu."

Li rediris: "Mi ne naskiĝis por la vivado, kiun ĉiuj vivas. Feliĉe, mi ekkonsciis pri tio ĝustatempe, kaj mi ja ofte konstatis, ke mi ne eraris."

Miaj gepatroj, mercerist-komercistoj en Verdio, kaj sufiĉe riĉaj, havis multe da ambicio pri mi. Ili metis min en pensionon, dum mi estis ankoraŭ tre juna. Oni ne scias kiom povas suferi infano en gimnazio, pro la nura fakto de la disigo, la izolado. Tiu vivado unuforma kaj sen tenereco, estas bona por iuj, malbonega por la aliaj. La etuloj ofte havas la koron multe pli sentema ol ni kredas, kaj

tiamaniere enfermante ilin tro junaj, malproksime de tiuj, kiujn ili amas, oni povas ekscese kreskigi sentemecon, kiu ekzaltiĝas, fariĝas malsanema kaj danĝera.

Mi malmulte ludis, mi ne havis kamaradojn, mi pasigis miajn horojn bedaŭrante mian domon, nokte mi ploradis en mia lito, mi streĉis la cerbon por trovi memoraĵojn de mia hejmo, malgravajn memoraĵojn pri malgrandaj aferoj, malgrandaj faktoj. Senĉese mi pensis pri ĉio, kio mi lasis tie for. Mi malrapide fariĝis ekzaltito, al kiu la plej malgrandaj ĉagrenaĵoj estis teruraj afliktoj.

Krome, mi restis neparolema, malsociema, nekomunikema, kaj sen konfidenculoj. Tiu mensa ekscitlaboro obskure okazis, sed nepre. La nervoj de la infanoj rapide agitiĝas; ni devus diligente atenti, ke ili vivu en profunda paco, ĝis ilia preskaŭ plena kreskado. Sed kiu do pensas, ke al iuj gimnazianoj, maljusta puntakso povas ankaŭ kaŭzi tiel gravan doloron, kiel pli poste okazigos la morto de amiko; kiu do ekzakte komprenas, ke iuj junaj animoj sentas terurajn emociojn pro preskaŭ nenio, kaj rapide fariĝas malsanaj animoj, nekuraĉeblaj?

Estis mia kazo; tiu kapablo pri bedaŭro disvolviĝis en mi tiamaniere, ke mia tuta ekzistado fariĝis martireco.

Tion mi ne diris, mi diris nenion; sed iom post iom mia sentemeco, aŭ prefere mia sensiveco fariĝis tiom akra, ke mia animo similis al kruda vundo. Ĉio, kio tuŝis ĝin kaŭzis en ĝi taŭzadojn pro suferado, hororajn vibradojn, kaj konsekvence verajn difektojn. Feliĉaj estas la homoj, kiujn la naturo kirasis per indiferenteco, kaj armis per stoikeco!

Kiam mi aĝis dek ses jarojn, pro tiu emo suferi pri ĉio, ekscesa timideco invadis min. Sentante min malprotektita kontraŭ ĉiuj atakoj de la hazardo aŭ la destino, mi timis ĉiujn kontaktojn, ĉiujn alproksimiĝojn, ĉiujn eventojn. Mi singarde vivis, kiel sub la

konstanta minaco de nekonata kaj ĉiam atendata malfeliĉo. Publike, mi kuraĝis nek paroli, nek agi. Mi ja sentis, ke la vivo estis batalado, terura luklado, en kiu ni ricevas hororajn frapojn, vundojn dolorigajn, mortigajn. Anstataŭ nutri, kiel ĉiuj homoj, la feliĉan esperon de la estonteco, mi konservis nur la konfuzan timon, kaj mi sentis en mi bezonon kaŝi min, eviti tiun batalon, en kiu mi estus venkita kaj mortigita.

Miaj stutadoj finiĝintaj, oni donis al mi ses monatojn de libertempo por elekti karieron. Evento, ja simpla, subite klarigis al mi mian situacion, montrigis al mi la malsaneman staton de mia spirito, komprenigis al mi la danĝeron, kaj decidis min, ke mi fuĝu ĝin.

Verdio estas malgranda urbo ĉirkaŭita de ebenaĵoj kaj arboroj. La gepatra domo troviĝis en la centra strato. Nun mi pasigis miajn tagojn malproksime de tiu loĝejo, kiun mi tiom bedaŭris, tiom deziris. Revadoj revigliĝis en mi, kaj mi promenadis tra la kampoj, tute sola, por lasi ilin forkuri, forflugi.

Mia patro kaj mia patrino, komplete okupataj de sia komerco, kaj zorgataj pro mia estonteco, parolis al mi nur sian vendon aŭ pri miaj eblaj projektoj. Ili amis min, kiel pozitivaj geuloj, kun praktika spirito; ili amis min per sia racio, multe pli ol per sia koro; mi vivis enmurigata en miaj pensoj, kaj tremetante pro mia senĉesa maltrankvilo.

Nu, iun vesperon, post longa kurso, dum mi revenis hejmen grandpaŝe por ne malfruigi min, mi ekvidis hundon, kiu galopis al mi. Ĝi estis speco de ruĝa spaniolo, tre maldika, kun longaj frizaj oreloj.

Kiam ĝi estis je dek paŝoj de mi, ĝi haltis. Kaj mi same faris. Tiam ĝi ekmovetadis sian voston, kaj malgrandpaŝe alproksimiĝis kun timemaj movoj de sia tuta korpo, sin klinante sur siaj piedoj, kiel por humile peti min, kaj milde movante la kapon. Mi alvokis ĝin. Tiam ĝi mienis rampi per irmaniero tiel humila, tiel malgaja, tiel peteganta, ke mi sentis min kun

larmoj en la okuloj. Mi iris al ĝi, ĝi forkuris, poste revenis, kaj mi metis genuon surteren, dirante al ĝi dolĉaĵojn por altiri ĝin. Fine ĝi sin trovis atingebla, kaj tute milde mi karesis ĝin kun ekstremaj singardemoj.

Ĝi kuraĝiĝis, iom post iom releviĝis, metis siajn piedojn sur miajn ŝultrojn, kaj eklekis mian vizaĝon. Poste ĝi sekvis min ĝis la domo.

Ĝi estis vere la unua estaĵo, kiun mi pasie amis, ĉar ĝi redonis al mi mian tenerecon. Mia korinklino al tiu besto estis ja certe troiga kaj ridinda. Ŝajnis konfuze al mi, ke ni estis du fratoj, perditaj sur la tero, tiel izolataj, kaj sen defendo, unu kiel la alia. Ĝi ne plu forlasis min, dormis piede de mia lito, manĝis ĉe la tablo malgraŭ la malkontenteco de miaj gepatroj, kaj ĝi sekvis min dum miaj solaj kursadoj.

Mi ofte haltis sur la bordoj de fosaĵo, kaj mi sidiĝis sur la herbon. Tuj Sam alkuris, kuŝiĝis ĉe mia flanko aŭ sur miaj genuoj, kaj ĝi levis mian manon per la pinto de sia muzelo por peti karesojn.

Iun tagon, ĉirkaŭ juniofinon, dum ni troviĝis sur la vojo de Sankta-Petro-de-Ŝavrolo, mi ekvidis la diliĝencon, kiu venis de Ravero. Ĝi alkuris, trenata per la galopo de kvar ĉevaloj, kun sia flava kofro kaj la kaskedo el nigra lido, kiu kapvestis ĝian imperialon. La koĉero klakigis sian vipon; polvonubo leviĝis sub la radoj de la peza veturilo, kaj poste, kiel nubo, ŝvebis malantaŭe.

Kaj subite, dum la veturilo alvenis al mi, Sam, eble timigita pro bruo, kaj volante kunigi al mi, sin impetis antaŭ ĝi. La piedo de ĉevalo faligis ĝin, mi vidis ĝin ruli, turni, sin relevi, refali sub ĉiuj tiuj piedoj, poste la tuta veturilo faris du grandajn skuojn, kaj malantaŭ ĝi mi ekvidis, en la polvo, ion kiu moviĝis sur la vojo. Sam estis preskaŭ duone tranĉita, la tuta interna de ĝia disŝirita ventro pendis, eliris kun sangbuloj. Ĝi provis sin relevi, marŝi, sed la du antaŭaj kruroj povis nur moviĝi, kaj

